Johann Wolfgang von Goethe,

# Knab' rozeton vidis li

*tradukita de Joachim Gießner*

Knab' rozeton vidis li;
erikeja floro.
Juna, bela estis ĝi.
Por admiri kuris li
ĝoje kun adoro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Diris knab': „Mi rompos vin,
vi rozeta floro“.
Diris roz': „Mi pikos vin,
ke vi ne forgesos min,
premas min doloro.“.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Knab' sovaĝa rompis ĝin;
erikeja floro.
Rozo ja defendis sin
kaj sufere pikis lin,
ne utilis ploro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)*

*Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en* `http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf`.

Johann Wolfgang von Goethe,

# La rozeto

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Knabo vidis – jen rozeto
Sur la kampo staras;
Bela, juna la floreto . . .
Vive kuras la knabeto,
Ĝojas, miras, flaras.
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

Knabo diris : « mi eltiros
Belulinon mian »;
Floro diris : « vi foriros, –
Per pikiloj mi disŝiros
Tuj la manon vian ».
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante
La rozeton prenis, –
La floreto batalante
Sin defendis pikadante,
Sed la sorto venis.
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

*Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)*

*Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en* `http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php`.

Johann Wolfgang von Goethe,

# Heidenröslein

Sah ein Knab ein Röslein stehn,
Röslein auf der Heiden,
War so jung und morgenschön,
Lief er schnell, es nah zu sehn,
Sah's mit vielen Freuden.
Röslein, Röslein, Röslein rot,
Röslein auf der Heiden.

Knabe sprach: „Ich breche dich,
Röslein auf der Heiden!“
Röslein sprach: „Ich steche dich,
Dass du ewig denkst an mich,
Und ich will's nicht leiden.“
Röslein, Röslein, Röslein rot,
Röslein auf der Heiden.

Und der wilde Knabe brach
's Röslein auf der Heiden;
Röslein wehrte sich und stach,
Half ihm doch kein Weh und Ach,
Musst es eben leiden.
Röslein, Röslein, Röslein rot,
Röslein auf der Heiden.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)*

*La poemo troviĝas en* `http://de.wikipedia.org/wiki/HeidenrГұslein`. *Melodioj estas aŭdeblaŭ en* `http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html`.
*La plej konata Melodio estas tiu, kiun verkis Heinrich Werner. Pri tiu vidu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)`.